

INTERLANGUAGE



# AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

"PEOPLES SPEAKING TO  
PEOPLES"

A WORLD INTERLANGUAGE  
NEEDED

ESPERANTO SOLVES THE  
PROBLEM

**AMERIKA ESPERANTISTO**

*Oficiala Organo de la  
ESPERANTO-ASOCIO  
de NORD-AMERIKO*

**JUNE 1951**

*Twenty-five Cents*

## AMERICAN ESPERANTO MAGAZINE

(*Amerika Esperantisto*)

G. ALAN CONNOR, *Editor*

Vol. 65

114 West 16th Street  
New York 11,  
N. Y.

No. 6

*Associate Editors:* Dr. W. Solzbacher, Doris Tappan Connor, Dr. Norman McQuown, Dr. S. Zamenhof, V. Rev. Gabriel N. Pausback, Howard E. Latham, Myron Mychajliw.

*Sustaining Board:* Dr. Luella K. Beecher, John M. Brewer, Olive Campbell, J.F. Clewe, Preston Davis, Jr., E.G. Dodge, R.E. Dooley, Harold Ewen, Dr. G.P. Ferree, Anonymous, Thomas Goldman, George Hirsch, H. F. Keller, Eulalia Marks, Tony Nabby, R. C. Palmer, D. B. Richardson, Tom Robbins, Beatrice Ruff, Mazah Schulz, Bertha F. Sloan, Harold S. Sloan, Isabel Snelgrove, Francis H. Sumner, Adeline Vigelis, Anonima. Dr. Francis E. Ballard, Dr. W. Solzbacher.


*Office Assistants:* Lola Mae Muse, H.S. Harris.

# KON-TIKI

By THOR HEYERDAHL

**The greatest true adventure story ever! Now available in Esperanto. 6 modern Norsemen cross the Pacific on a 40-foot raft to unravel a 1000-year-old mystery. From first gripping page to last, you will say it's wonderful. The Esperanto edition has been translated in vivid, flowing style, retaining all the wry good humor and exciting adventure. With 80 photographs. Bound in blue cloth, stamped in gold.**

**\$3.90 Postpaid**



**Enjoy reading this exciting best seller today! Order from:  
Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.**

*Jarabono eksterlande, \$1.50 por kalendara jaro*

**Make Checks Payable to Esperanto Association of North America**


**Minimum Membership in E.A.N.A.—\$3.00 per Year  
Active Sustaining Membership — \$5.00 per Year**

# AMERIKA ESPERANTISTO

Vol. 65

JUNE 1951

No. 6



The World Interlanguage Esperanto and the Esperanto movement in America were discussed Tuesday, June 12, on the French language Voice of America program, *Ici New-York*, when *Dr. William Solzbacher*, President of the Esperanto Association of North America, was interviewed by *Mademoiselle Nicole de la Meslière*, well-known reporter, announcer, and writer of special features for VOA. The program was heard over shortwave from the United States as well as over all transmitters of the *National Chain* of the French Radio Network.


The interview was in French, but at one point Dr. Solzbacher spoke Esperanto, addressing a special word of greeting to the Esperanto movement in France on behalf of the *EANA*. Dr. Solzbacher mentioned in particular the worldwide Petition to the *UN* which was presented last August. Its most prominent signer was the President of France, *M. Vincent Auriol*. The petition obtained 895,432 individual signatures and was formally endorsed by 492 organizations with a combined membership of 15,454,780.

Esperanto literature and the practical application of the interlanguage in travel, commerce, science, etc., were also emphasized. Dr. Solzbacher pointed out that Esperanto is being taught at a number of American universities, colleges, and high schools.

The Esperanto program was featured by the Voice of America in reply to numerous requests from French listeners.

## ESPERANTO IN ACTION

AROUND THE WORLD



**The Esperanto Association of North America** is listed in this year's editions of *The World Almanac* (p. 596), *The New International Year Book* (p. 548), and the *Funk & Wagnalls New Standard Encyclopedia Year Book* (p. 400).

**Esperanto Summaries in scholarly publications** are becoming more and more numerous. Recent additions include: a mathematical doctoral thesis by *C.P.S. van Oosten*, University of Leiden, Netherlands (April 1951); a mathematical study by *Prof. Tokui Sato* in *The Memoirs of the Faculty of Science*, Kyusyu University, Japan (Vol. V, No. 1); and an article, "Note on a Lorenz Invariant Integration in the Quantum Field Theory". by *Prof. Ziro Koba*, in the organ of the Japanese Society of Physics (July-August 1950).

**Newsweek, of April 16**, printed the picture of a Vienna policeman, *Anton Ifkovicz*, who speaks English, French, Italian, Russian, Czech, Slovak, Polish, Croatian, Hungarian, and Rumanian, in addition to his native German. "No Esperanto?", the news magazine commented.

**Archeological research** will again benefit from the use of Esperanto this summer when students from a number of countries will work together on the Danish island of Bornholm. They will dig out pre-historic dwellings from the early iron age at a site near Dalshøj, under the supervision of experts from the National Museum in Copenhagen. Esperanto will be the only language used. The work camp is organized by Denmark's International Student Committee in cooperation with the Esperanto Club of the University of Copenhagen. The camps are subsidized by the Danish Government.


**A World Radio Message from the youth of Wales** to the youth of the world was broadcast May 18, 1951, as in previous years, stressing friendship and cooperation among young people everywhere. The message was in seven languages including Esperanto.

**In Bonn, capital of Western Germany**, Esperanto is taught as a compulsory subject 5 hours a week in the fifth grade of a public elementary school. The Superintendent of Schools, *Herr Niffka*, declared at a teachers' conference attended by 200 educators that the Esperanto classes are not meant to compete with the teaching of other languages, but that they are expected to enable a larger number of people to make themselves understood outside their own country.

## WHAT CAN WE DO FOR ESPERANTO THIS SUMMER?

(1) This is the time of the year when many of us travel and meet new and interesting people. Why not tell them about Esperanto? And why not always have on hand a quantity of EANA's effective folder, *For Better International Understanding* (free from headquarters), and of PGL 183 (25 for 50 cents, 100 for two dollars)? Some paper-bound copies of the encyclopedic handbook *Esperanto: The World Interlanguage* (\$1.50 each; 6 to 11 copies, \$1.35 each; 12 or more copies, \$1.25 each) will also come in handy.

(2) This is the time of the year when we have leisure to read some of the books we always wanted to read. Why not buy and read some good Esperanto literature? You know there is a wide choice of books for every taste: from detective stories to classic literature, and from science and technology to religion and art.



(3) Now is the time to plan classes, campaigns, and any other kind of action for the coming fall and winter. How and where could you teach a class or organize one for someone else? Is there a possibility of starting a reading circle, an informal conversation group, or a club? It is wise to make preliminary contacts now and to brush up on your knowledge of the language and the movement, if it has become somewhat rusty. Maybe your club or class could use a set of the ultra-modern *Connor Course* on records?

(4) This is also a good time for writing letters to newspapers and magazines drawing attention to Esperanto and giving the address of the *Esperanto Association of North America* from which free literature may be obtained on request. Editor's desks are now not so swamped with letters and articles as during the rest of the year. Your chance of breaking into print is much better. Why not use it?



(5) It may also be a good idea to see if you can get your local radio station to broadcast some news on Esperanto. Or if you have local programs of interviews, quizzes, etc., you might arrange to tell about your interest in Esperanto as a hobby. Anytime you can, you should suggest that national headquarters will gladly and freely send complete information on Esperanto to all listeners who may wish it.

To quote from a recent article by *James Gowing* in our brother publication *The British Esperantist*: "The above activities are in no way extraordinary—all that they require is a little time and effort, and above all, the determination *not* to leave the task to someone else."

**Every Month Of The Year Can Be A Good Month For Esperanto!**

## ESPERANTA GEFRATARO POR KOLEGIOJ FONDIĜIS

(Raporto de la Sekretariino *Bettieann Kos*)

*Iota Epsilon Alpha*, unua Esperanta gefratara en Usono enkondukis kvardek-unu membrojn la 24an de Majo dum ceremonio en la *Ŝtata Universitato Bowling Green*, Bowling Green, Ohio. D-ro *John V. Haggard*, profesoro de lingvoj en la universitato, iniciatis la grupon pasintan aŭtunon por la studado de la interlingvo Esperanto inter kolegianoj. Jam aperis diversaj artikoloj en gazetoj en Ohio. Nuntempe montriĝas multe da entuziasmo pri la gefratara, kaj ni anticipas sukcesplenan jaron venontaŭtune kaj vintre.

**Studvojaĝo tra Usono** estas planata de S-ro *Vainö Tuomisaari*, direktoro de la *Vespera Lernejo* por Plenkreskuloj en Varkaus, Finlando. S-ro Tuomisaari speciale deziras studi la sistemon de lokaj vesperaj lernejoj en Usono, sed li ankaŭ deziras viziti Esperanto-grupojn. Li povas fari prelegojn kun lumbildoj (aŭ eble kinomatografa filmo) pri Finlando. Li planas viziti Usonon dum Februaro-Majo 1952. Se vi aŭ via loka grupo interesiĝas pri ebla gastigado de S-ro Tuomisaari ventonsezone, bonvolu skribi pri ĝi al la Centra Oficejo de EANA.

**Esperanto Examinations:** The EANA conducts two grades of examination: preliminary and advanced. Successful candidates receive diplomas. You may receive full details of the rules for examinations by writing the Central Office of EANA. Ask for the *application form for EANA examinations*.

**Lasta alvoko!** La 41a Kongreso de EANA okazos 29 Junio-1 Julio en Spencer, Iowa. Se vi ektrovas, ke vi povas ĉeesti iujn kunvenojn, eĉ se nur dum unu tago, ne hezitu veni lastmomente. Estas spaco en la hoteloj kaj bonveno en la koroj.

---

(de paĝo 55)

kaj tiuj, kiuj pagas pli altan kotizon kiel Patronaj kaj Subtenantaj membroj meritas specialan dankon. EANA ankaŭ ricevis grandan helpon en la formo de subvencio de la *Komitato por Publikaj Rilatoj*. Nur tiu ekstra helpo ebligas la daŭran funkciadon de EANA laŭ nuna agado. Nia konstanta problemo estas, do, kiel kreskigi la ordinarajn, normalajn enspezojn (kotizojn kaj kontribuojn) de la Asocio por ke ĝi staru sur firma financa bazo. La raporto de la kasisto prezentos tri eblecojn por diskuto kaj pripenso de la membraro: 1) Daŭra kaj kreskanta subteno de la Subtena Komitato pere de niaj membroj; 2) Plialtigo de la jara membrokotizo; 3) Konstanta kaj granda kresko en la nombro de membroj. Detalan raporton pri la financaj operacioj de EANA oni aŭdos dum la Kongreso, kaj ĉiu membro ricevos ĝin en plena jarraporto post la Kongreso.

G. Alan Connor, Ĝenerala Sekretario

## KONCIZA JAR-RAPORTO DE EANA

Ĉi sube ni donas koncizan raporton pri la agado de EANA dum la pasinta administra jaro (31 Majo 1950 – 1 Junio 1951). Ĝi estos la bazo por diskuto dum la Kongreso en Spencer, Iowa. Plenan raporton ni donos dum la Kongreso kaj publikigos ĝin en aparta postkongresa bulteno, kiun ricevos ĉiu membro de EANA.

*Esperanto Asocio de Nord-Ameriko (EANA)* estas la oficiala landa asocio por Usono kaj Kanado. Ĝi estas neŭtrala, kaj agas laŭ politikaj kaj sociaj principoj akceptitaj en niaj landoj – libereco kaj demokrateco. Lojaleco al tiuj principoj ekskluzivas kunlaboron kun organizoj kaj elementoj subfosaj, eĉ se ili uzas Esperanton.

*La Estraro de EANA* konsistas de: D-ro W. Solzbacher, Prezidanto; Profesoro John M. Brewer, Vic-Prezidanto; G. Alan Connor, Ĝenerala Sekretario; Harry Harrison, Kasisto; Gilbert Nickel, Eulalia Marks, W. D. B. Hackett (Kanado).

*La Centra Oficejo de EANA* estas ĉe 114 W. 16 St., New York, N.Y. En ĝi laboras konstante kaj plentempe tri oficistoj, kaj por speciale urĝaj laboroj helpas volontuloj (tri kvar personoj). La ĉefaj taskoj de la CO estas: 1) Servi al la membroj per eldonado de gazeto, libroservo, respondo al leteroj, helpo en esperantistaj aferoj, konsilo al lokaj grupoj kaj kursoj. 2) Propagandi Esperanton inter la ĝenerala publiko. 3) Reprezenti la Asocion en rilatoj kun oficialaj instancoj.

Por tiuj celoj la CO eldonas ĉiumonatan gazeton *Amerika Esperantisto*, laŭokazajn bultenojn kaj cirkulerojn. La libroservo havas kelkcent titolojn de diversaj esperantaj libroj kaj en stokobonankvanton da libroj de ĉiuj specoj. De Januaro ĝis Junio 1951, la CO ricevis 2880 korespondaĵojn kaj ekspedis 3691 (kompreneble ne enalkulante gazetojn kaj ĝeneralajn cirkulerojn). Por la membroj la CO peradas internacian korespondon, abonon de eksterlandaj gazetoj, kaj aliĝon al internaciaj organizoj. La novan korespondan kurson de Esperanto *Common Course* studas 34 individuoj kaj 5 grupoj kun prok. 42 personoj.

La CO donis specialan atenton ĉi jare al kampanjo pri varbado de novaj membroj. Per kunlaboro de niaj aktivuloj, kiuj metis artikolojn en nacilingvaj gazetoj ni ricevis 2347 informpetojn. La *Komitato por Publikaj Rilatoj* ankaŭ aranĝis specialan kampanjon, kaj sendis 5193 specialajn cirkulerojn al elektitaj listoj. El la tuto rezultis 259 novaj membroj por EANA dum la jaro. Nun la stato de EANA estas 756 membroj, kiuj havas plenpagitan jarkotizon. Se ni ankaŭ enalkulas 72 personojn, kiuj estis membroj ĝis Januaro 1951 (do, duono de la administra jaro), kaj de kiu ni atendas renovigon, la fina membro-nombro estas 828. Malrapide, sed certe, ni alproksimiĝas al MILO.

*Bazajn financajn rimedojn* por perfekta funkciado de la CO kaj por propaganda laboro donas la membraro. Membroj de la Subtena Komitato

## ESPERANTO - KRONIKO

**"Staff News"**, gazeto de la Publika Biblioteko en New York, menciis Esperanton en ĝia numero de 10 Majo 1951. La gazeto raportis, ke dum radio-programo la 4an de Majo ĉe stacio WCBS, New York, *F-ino Mary Marrett* de la Fako pri Publikaj Informoj, parolis pri la kolekto de Esperanto-libroj en la centra biblioteko.

**St. Barnabas Chronicle**, gazeto de altlernejo por knabinoj en Bronx, New York, enhavis longan artikolon pri Esperanto laŭ intervjuo kun D-ro William Solzbacher.

**S-ino O. Bervy**, el Kingston, Ontario, publikigis du longajn artikolojn pri Esperanto en angla- kaj ruslingvaj gazetoj. En loka gazeto de la sama urbo aperis "Letero al la Redaktoro" skribita de *G. Norman McKinney*. Rezultis diversaj informpetoj el Kanado.

**En Roseburg, Oregon**, kvin studentoj de altlernejo studas Esperanton sub gvidado de *Warren Ewing*, instruisto en la lernejo. *Steven E. Gallant* estas sekretario de la grupo.

**Lago de Como**, nova, bela broŝuro en Esperanto priskribas la vidindaĵojn de famkonata itala urbo Como kaj ĝia lago. Oni povas ricevi ekzempleron senpage de: *Ente Provinciale per il Turismo, Piazza Cacciatori delle Alpi, Como, Italujo*. Skribu multnombre.

**S-ro Rintaro Taki**, japana samideano, Vic-Prezidanto de la Taki Kompanio, kiu fabrikas kemiajn produktaĵojn, nun vizitas Usonon. Verŝajne li partoprenos la Kongreson en Spencer, Iowa.

**En angla kurso de altlernejo**, Clarkdale, Arizona, *Preston J. Heinle* prezentis unuhoran paroladon pri Esperanto. Por montri la uzon de diversaj sufiksoj en Esperanto, li utiligis la vortradikon "fiŝ-", kaj sukcesis per bonhumoraj situacioj tute kapti la atenton kaj intereson de la studentoj.

**El Noumea, Nov-Kaledonio**, en la fora pacifikinsularo, ni ricevis leteron de *S-ino Eulalia Marks*. Ŝi flugis al Noumea en Majo por viziti sian filinon, kiu loĝas tie. Laŭ la letero, S-ino Marks ne lasas preterpasi oportunun paroli pri Esperanto. Ekzemple, ŝi parolis en Suva, Fiji-Insuloj, dum bankedo en kiu ŝi partoprenis kiel gasto de la guberniestro. Ŝi revenas nun al Usono por ĉeesti la Kongreson en Spencer.

**Pri Esperanto por blinduloj**: *S-ro Alfred Doten* sendis al ni la jenajn informojn. Oni povas ricevi lernolibron de Esperanto en brajla skribo de *The Howe Press, Perkins Institute for the Blind, Watertown, Mass.* Prezo \$1.00. En Anglujo, en la *Nacia Biblioteko por Blinduloj, 35 Great Smith St., Westminster, London S.W.1*, estas Esperanto-fako de eble kelkcent da titoloj en brajla skribo. Oni pruntedonas tiujn librojn senpage al blinduloj, kiuj loĝas en landoj apartenantaj al la Internacia Poŝta Unuiĝo.



# Pensu kaj Ridu

**El Fabloj de Ezopo:** *Viro kaj Liaj Du Edzinoj . . .*

En la tempo, kiam viro povis havi pli multe da edzinoj ol nun, mezaĝa fraŭlo, kiun oni povis nomi nek juna, nek maljuna kaj kies haroj ĵus komencis griziĝi, enamiĝis samtempe je du virinoj kaj edziĝis kun ili ambaŭ. Unu el ili estis juna kaj plenfloranta, kaj deziris, ke ŝia edzo aspektu tiel juna, kiel ŝi mem. La alia estis multe pli aĝa kaj deziregis, ke la edzo aspektu konvena kunulo al ŝi. Tial, dum la pli juna uzis ĉiun okazon eltiri la grizajn harojn de sia edzo, la malpli juna estis tre laborema en eltirado de nigraj haroj, kiujn ŝi povis trovi ĉe la edzo. La viro dumtempe estis feliĉa kaj kontenta de ilia zorgado kaj sindonado, ĝis unu matenon li vekiĝis inter la du kaj trovis sin tute senhara.

*Li, kiu submetas siajn principojn al la influo kaj kapricoj de kontraŭstarantaj partioj, finvenos al tuta perdo de la principoj.*

(Traduko de K. Ossaka)

**Energia laboranto:** Rusa spiono estis sendita en trompvesto al orienta Germanujo por informiĝi pri la ĝenerala opinio pri la Rusa okupado. Post multaj malkuraĝigaj spertoj, fine li renkontis germanon, kiu ŝajne estis tute kontenta je la situacio.

"La aliaj povas diri kion ili deziras pri la komunistoj," li deklaris, "sed mi pli preferas labori por la komunistoj ol por iu ajn alia."

"Mi ĝojas aŭdi tion," diris la spiono, "Diru al mi, mia bonegulo, kion vi faras por vivteni vin?"

"Mi estas tombofosanto," respondis la laboranto.

— el *The Sign*, Majo 1951



## La Ĉirkaŭaĵo

Fabelo Persa diras: Argilbulo  
Troviĝis iun tagon de vagulo;  
Parfumo ĝia tiel dolĉa estis,  
Ĝi tutan ĉambron bonodore vestis.

"Vi, kio estas?" estis tuj demando,  
"Ĉu iu gemo de la samarkando,  
Ĉu nardo vi sub kruda eksteraĵo,  
Aŭ ĉu alia rara valoraĵo?"

"Ne, mi nur estas iu argilpeco."  
"De kie, do, ĉi mirbonodoreco?"  
"Amiko, de l' sekreto jen ekspozo:  
Mi kunloĝadis ja kun dolĉa rozo."

tr. Milton E. Davis

## Verso el Omar Kajam

Printempo! Vino! Kaj la amatin'  
En la dezerto por karesi min.  
Por kio paradizon serĉi, do?  
La Paradizon — jam mi trovis ĝin!

tr. D. B. Richardson



## Vetero

Ĉu estas varmege  
Aŭ malvarme tre,  
Ni havos veteron  
Ĉu jes aŭ ĉu ne!

tr. G. Saunders



## DEZIRAS KORESPONDI



*Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkuponon); Enlande, unu vorto por du cendoj.*

**Francujo.** Robert Farail, 17 Kajo Richelieu, *Bordeaux*. Sporta ĵurnalisto deziras korespondi pri ĉiuj temoj.

**Italujo.** Serafino Mascolo, Via C. Serra 32, *Napoli*. 30-jara, doktoro en leĝo, oficisto de banko, dez. kor. kun samideanoj tutmonde.

**Japanujo.** Asano Tasuku, 946 Wadahon-cho, Suginamiku, *Tokio*. Deziras korespondi kun lernantoj.

**Jugoslavujo.** Pavloviĉ Zivota, ul. 8 maja 39, *Zagreb*. 23-j. dez. kor. kaj interŝanĝi PM kaj turistprospektojn kun Usono.

**Koreo.** S-ro L. Verdond, P.O. Box 100, *Pusan*. Redaktoro de kontraŭ-komunista gazeto dez. kor. pri politiko.

**Koreo.** F-ino I. Gesun, P.O. Box 100, *Pusan*. Deziras korespondi pri literaturo.

**Usono.** S-ro A.J. Rogus, P.O. Box 603, *Passaic, N.J.* aĉetos novan aŭ malnovan libron *Sinjoro Tadeo* (Pan Tadeusz) de A. Mickiewicz, traduko de A. Grabowski. Ankaŭ aĉetos Polan-Esperantan vortaron - novan aŭ malnovan.

**Koreo.** S-ro K.C. Huang, P.O. Box 100, *Pusan*. Dez. kor. pri ĉiu temo.



**Inter Sudo kaj Nordo**, 8 originalaj noveloj de Ferenc Szilágyi. 185 paĝoj. Eldona Societo Esperanto, *Stockholm*, 1951. Bindita. Havebla de EANA, \$1.85.

Ferenc Szilágyi jam estas konata inter la Esperantistoj pro siaj noveloj, kaj ĉi tiu nova verko povas nur pligrandigi lian famon. Kvin el la ok noveloj estas tre belaj rakontoj, kiuj viviĝas antaŭ la okuloj de la leganto. Plej interesis min *La Enirejo de la Tunelo*, filozofia rakonto pri ebrulo, kiu perdis sian biciklon; *Aventuro en Kvar Etapoj*, gaja sonĝo pri renkonto kun glaciurso; *Kiu Donis*, *Kiu Ricevis*, pri la vivo de junulo antaŭ kaj post la dua mondmilito; *Sinamo*, pri infano provante lerni la signifon de tiu termino, samtempe tre amuzante la leganton; kaj *Inter Sudo kaj Nordo*, pri la spertoj de la aŭtoro kiam li agadis kiel interpretisto por novalvenintaj hungaroj al Svedujo.

Szilágyi havas simplan stilon, kaj estas konata pro sia interesa vortuzado. La vortaro uzata estas malgranda, tiel la libro taŭgas kiel legolibro por mezprogresantoj en Esperanto. La unua rakonto uzas nur 420 radikojn kaj afiksojn, tamen, pro la interesa vortkombinado, tute ne ŝajnas ripetema.

Mi rekomendas la jenan kolekton kiel distraĵon pri kiu oni povas fiere diri "Mi legis ĝin".

— Donald R. Broadribb

## POPULAR ESPERANTO BOOKS

*The Central Office is equipped to supply all your book needs. Here are a few popular and standard items. 10% discount in quantity.*

ESPERANTO HOME STUDENT, James Robbie. Beginner's text for class or self-instruction. Brief course of 64 pages .....	.25c
REED'S PRACTICAL GRAMMAR, Dr. Ivy Kellerman-Reed. Very complete beginner's text for self or classes, giving extensive examples, dialogue, etc. Offset reprint, with some pages slightly blurred but fully usable. 142 pp. with index. Original price 75c, reduced to less than half-price .....	.35c
PRACTICAL ESPERANTO, Dr. Wm. Benson. Many use this text for class or self because it is unique with 650 entertaining illustrations for rules, affixes, vocabulary, etc. Grammar in English, exercises in Esperanto with pictures. 160 pp. ....	.30c
ESPERANTO: THE WORLD INTERLANGUAGE, Connor-Solzbacher-Kao. The new complete manual of Esperanto. "Six-books-in-one": history, textbook, reader, world directory, and two dictionaries. All in one volume. 245 pp. ....Paper \$1.50; Cloth	\$3.00
UNIVERSALA ESPERANTO METODO, Dr. Benson. A rare wonder-book with 11,000 pictures, all-Esperanto, 560 pp. ....Cloth	\$6.00
ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY, Cox. A detailed analysis of Esperanto grammar, with examples .371 pp. ....Cloth	\$1.50
WORLD'S CHIEF LANGUAGES, Prof. Mario A. Pei. A guide to languages of entire world, incl. <i>Esperanto</i> . 663 pp. ....Cloth	\$6.00
AMERICAN POCKET DICTIONARY, Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's little pocket companion. Offset ed. 80 pp. ....	.25c
EDINBURGH DICTIONARY. Esp-Eng & Eng-Esp. Complete, in concise form. The very best small dictionary. 288 pp. ....Cloth	.85c
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. Latest edition with 2nd, 3rd, 4th, 5th, & 6th "Aldonoj al la Universala Vortaro de la Lingva Komitato". 490 pp. ....Cloth	\$2.60
FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO DICTIONARY. Latest edition including appendices of proper names and neologisms. Each meaning listed individually. 348 pp. ....Cloth	\$2.35
FUNDAMENTA KRESTOMATIO Zamenhof and others. Model chrestomathy and literary guide. 472 pp. ....Paper bound	1.50
Rare ed., ptd 1924, royal blue cloth with gold .....	Cloth bound 2.50
KARLO, Privat. Very popular easy first-reader, used in many classes. Life of Karlo from boyhood to marriage. 43 pp. ....	.25c
THE BIBLE in Esperanto (Sankta Biblio). The best "Reader". Bound in blue, art vellum, 8vo, 996 pp. ....Cloth	\$2.00
ESPERANTO SORTIMENTO. Five books, good reading at low cost: <i>Akrobato de Nia Sinjorino</i> , legend of France, 25 pp; <i>Blanche-Virgulino de Lille</i> , medieval romance, 42pp; <i>Lando de Arĝenta Akvo</i> , story of Far West, 48 pp; <i>Miserere</i> , music story, <i>Thais</i> , by Anatole France, (2-in-1) 66pp; <i>Rozujo Ĉiumiljara</i> , miracle of love, 48 pp. Each book 25c. Entire sortimento for only	\$1.00
INDIAN BEAD STARS. White ground, green star in center .....	.85c
GREEN STARS. White ground, gold trim, brooch or button .....	.50c

**Esperanto, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.**

## GOOD BOOKS FOR YOUR SUMMER READING

**Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo**, Selection of articles published by the official Brazilian National Council of Geography. Beautiful volume on the life, customs, and country of Brazil (the Amazon, jungles, gauchos, natives, wondrous plants, etc.). 37 full-page art engravings, 152 pp. leatherette bound... \$4.00

**Ce la Sanktaj Ākvoj**, by J.C. Heer. An interesting novel, picturing the life of villagers in the Swiss Alps, under the constant threat of an avalanche. Parts I & II in one volume, half-cloth bound, illustrated cover, 216 pp. .... \$2.00

**Du Amsentaj Noveloj**, "Imenlago" by Theodor Storm, and "Maruška" by Escherich. Two famous stories ..... .60¢

**Inter Sudo kaj Nordo**, by Ferenc Szilagyi. Excellent short stories, novelettes, commentaries on present day events. Bound in grey-simulated-cloth effect, 180 pp. .... \$1.85

**Ora Libro de la Esperanto Movado, 1887-1937**. A wealth of information with entire background of the Esperanto movement. Richly illustrated, paper cover. .... \$1.40

**Populara Lernolibro de Esperanto**, by L. Kokeny. Easy, graded reader, with questions after each topic. .... .50¢

**Dante: Infero**, famed translation by Kalocsay of the Divine Comedy. Esperanto literary treasure. Card cover. .... \$2.00

**Svisa Antologio**, ed. by Arthur Baur. The best of Swiss literature from all four groups (German, French, Italian, Roman-ansch). Paper edition, 540 pp. .... \$4.00

**Rare Collection of 25 Keys**, (25 languages with Esperanto): Albana, Angla-Esp, Esp-Angla, Āraba, Baska, Ĉeĥa, Dana, Estona, Finna, Flandra, Franca, Germana, Hispana, Hungara, Islanda, Itala, Japano, Norvega, Persa, Portugala, Romanĉa, Rusa, Slovaka, Sudafrika, Sveda. Complete for ..... \$2.75

**Jarmiloj Pasas**, Haefker. History of the world, written in Esperanto. 4 books in 1 vol. Deluxe bound, 500 pp. .... \$3.65

**Al Altaro de Dio**, Thalmaier. Catholic prayer-book in Esperanto. Paper edition, 43 pp. .... .35¢

**La Ĝoja Podio**, by Raymond Schwartz. A medley of good humored poems, articles, lectures, playlets, with the Latin Quarter flavor. Cloth-bound, 271 pp. .... \$1.40

**Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N.Y.**